


**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Smidéliusz

Kunlaborantoj:

Boo Mee Kim-Lindblom

Mauro La Torre

Stefan MacGill

Blazio Vaha

ENHAVO

Maŭro LA TORRE: <i>Jar(cent)komence</i>	1
Katalin SMIDÉLIUSZ: <i>Raporto pri la lastaj atingoj de la ID-projekto</i>	7
Renée TRIOLLE: <i>ILEI ĉe UNESCO</i>	13
<i>El la landoj kaj sekcioj (BE, BG, CN, ES, YU, PL, RO, RU, CH)</i>	15
<i>Leterkesto</i>	19
<i>Por via notlibro</i>	19
<i>DESKF: Ĉirkaŭdanuba kunlaboro (R.P)</i>	19
<i>Infana kongreso jam altiris tridekon! (smg)</i>	20
<i>Novajoj de la eldona fako (smg)</i>	21
<i>Administranto kaj ekspedanto serĉata (smg)</i>	21
<i>Donancintoj por ILEI</i>	22
<i>Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 1996-2000 (Jozefo NÉMETHI)</i>	22
<i>Programo kaj aliĝilo por la 35-a ILEI-Konferenco en Lovran (Rijeka)</i>	31

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.
Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.
<m.latorre@uniroma3.it>; <http://ips.uniroma3.it>
Interlernejaj projektoj, komunikiloj, terminaro, reprezentado.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario.
Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>
Lerniloj, komunikiloj, eldona agado.

Sekretario (aganta): Mariana Evlogieva, Drujha-2, PK 18, BG-1582 Sofia, Bulgario.
Tel. (359 2) 24-33-78. <intrpres@usa.net> aŭ <amuze@poboxes.com>
<http://www.poboxes.com/amuze>; <http://www.webalias.com/amuze>
Membraro, sekcioj, komitato

Viesekretario: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio. Tel. (+61 3) 9818 7358, fakso: (+61 3) 9905 3668.
<esperanto@education.monash.edu.au>
Lernejoj, konferencoj, gimnazio.

Kasisto: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge.
Tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Membro: *La estrara loko vakas, kun respondeco pri lerneja kaj universitata agado.*
Membro: *La estrara loko vakas, kun respondeco pri instruista trejnado kaj scienca esplorado.*

Pri la kompletigo de la estraro vidu detalojn en IPR 00/3!

Maŭro La Torre

JAR(CENT)KOMENCE

Se, verkante jarkomencan enkondukan mesaĝon, oni povas senti ian respondecan riskon formuli malĝustajn prognozojn kaj esprimi nerealismajn dezirojn, tiaj riskoj centobliĝas kaj milobliĝas komence de jarcento kaj jarmilo.

Komencante la 21-an jarcenton la instruantoj (kaj samtempe porpledantoj) de Esperanto spontane ekpensas pri la estonteco de sia lingvo. Ĉu en la nova periodo venkos la nuntempa tendenco al maljusta solvo de interetna komunikado, per altrudo al ĉiuj popoloj de la lingvo de la ekonomia plejfortulo? Tio estus ĝangala solvo, tamen tute ebla el materia vidpunkto. Aŭ ĉu – malgraŭ la nun malfavora potence-rilato – fine ekregos lingve pli justa komunika aranĝo, tia kian ni proponas?

Mi ne volas ludi je profetado, nek havas la konajn bazojn por scienceca antaŭvido, ĉu fine venkos la lingva demokrateco aŭ la ununacikultura superrego. Tamen, se ni estas sufiĉe konvinkitaj kaj organizitaj, ni povos, ĝis kiam eblos, batali por aserti, konstrui kaj diskonigi nian revatan solvon.

Sed, por redukti nian prognozan riskon, ni turnu nian rigardon al ĉi tiu unua jaro de la komencata jarcento. Interalie gravas por ni, ke la 2001-a jaro estas proklamita **Eŭropa Jaro de la Lingvoj (EJL)** fare de la Eŭropa Konsilantaro kaj de Eŭropa Unio¹, kio estas ideala kadro por diskonigi nian ekziston kaj iniciatojn.

En tiu kadro, kiuj estas la kampoj, kie ni volas agi prioritare, kaj kiuj la priaj planoj? Kiel internacia E-instruista asocio (ILEI), ni ĉi-jare volas koncentri nian atenton al kvar ĉefaj grupoj:

- interkultura edukado;
- universitata instruado;
- instruista trejnado;
- sistema kunlaborado kun UEA kaj TEJO.

¹ Infomojn pri *EJL* troveblas en Interreto:

- komuna ĉefpaĝo EK/Eŭ: [<http://www.eurolang2001.org>].
- Eŭropa Konsilantaro: [<http://culture.coe.fr/AEL2001EYL/ael0001.htm>];
- Eŭr. Unio: [<http://europa.eu.int/comm/education/languages/es/actions/year2001.html>];
- Pri la laboro de esperantistoj koncerne *EJL* vidu la diskutgrupon *Jaro-de-lingvoj-2001*, ekzemple ĉe [<http://it.egroups.com>].

1. Interkultura edukado

Dum la venonta (nord)somera internacia Konferenco de ILEI (2001. jul.28/aŭg.04 en Lovran, apud Rijeka, Kroatujo) ni konkludas la dujaran lernejan projekton *Interkulturo*, kie nun aktivas kvindeko da klasoj el ĉiuj kontinentoj, per publika prezento de la rezultoj, kaj honesta analizo de la renkontitaj problemoj.

Surbaze de la respondoj al la enketo farita inter la kunlaborantaj instruistoj, ni jam konstatas en tiuj lernejoj fortan emon al daŭrigo de similcela laboro ankaŭ dum la venonta jaro; dume alvenas aliĝpetoj de novaj kolegoj. Ĉu do ripeti la saman edukon “eksperimenton” aŭ ĉu inventi ion novan? Ni estas cerbumantaj pri tio, sed plej verŝajne la nun eksperimentata sistemo evoluos al pli konkreta kaj samtempe pli elasta propon(ar)o. Jam nun, kadre de la interreta Kvazaŭlernejo *Tibor Sekelj*, iom post iom konstruatas iuj “fakaj metiejoj” (la *Ludejo*, la *Proverbejo*, la *Popolmuzikejo*, la *Etna Matematikejo*, ktp.), kie iuj klasoj disvolvas apartajn subprojektojn en tiuj scikampoj: komparado de regionaj ludoj, kompara analizado de lokaj proverboj, kolektado kaj lernado de alilandaj popolkantoj, esplorado pri la historiaj “pruntvojoj” de personaj nomoj, simulado de praetnaj matematikoj, k.s. Samtempe en (aŭ ekster) la Kvazaŭlernejo iuj klasaroj aranĝis (aŭ daŭrigis) la partoprenon per Esperanto en apartaj internaciaj projektoj *Ludeŭrejo*, *Eŭroskola*, *Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo*, ..., dum en aliaj nelernejaj medioj – ekzemple en la junularaj medioj de TEJO – oni planas kaj okazigas interkulturajn kaj interlingvajn iniciatojn, ankaŭ kadre de la Eŭropa Jaro de la Lingvoj (*EJL*), kiel la Lingvaj Festivaloj.

La sperto en la ĝisnuna lerneja “projekto” de ILEI, kunlabore kun UEA, montris ke la lokaj kaj homaj cirkonstancoj estas tre variaj rilate al la ebloj konkretigi difinitajn partoprenmanierojn per difinitaj rimedoj kaj ritmoj. Tial imageble oni ekiros en la direkton de pluraj pli celitaj kaj *konkretaj projektoj* (kun difinitaj partoprenontoj, rimedoj kaj kondiĉoj), kiuj tamen plenumos komunan ĝeneralan celaron (lingva egalrajteco, kultura komparado, fora kunlaborado, ...) kaj ĝuos je laŭeble komunaj komunikaj medioj (paperaj informiloj, retaj diskutejoj, perkomputilaj babilejoj, TTT-paĝaroj, regionaj renkontiĝoj).

2. Universitata instruado

Jam temp esta' ke ILEI okupiĝu ankaŭ pri Esperanto en universitataj medioj. Ekzistas centoj da universitatuloj, kiuj legas kaj parolas la Internacian Lingvon. Multaj el ili iam okazigas prelegojn, kursojn aŭ esplorojn pri ĝi. Formiĝas (kaj bedaŭrinde ankaŭ malaperas) studentaj E-klubo, kies iniciatoj ofte ne estas tiom vaste konataj, kiom ili meritis. Tial unue ni serĉas kunlaborantojn por aktualigi nian arkivon kaj TTT-paĝaron pri Esperanto en universitatoj per oportuna enketado. Due ni intencas kunordigi kaj helpi la agadon je universitata nivelo, ankaŭ por faciligi novajn plurlandajn kunlaborojn

kaj studentajn interŝanĝojn per Esperanto. Tiukampe indas konstrui pli stabilajn rilatojn kun la aliaj organizoj, kiuj agas sur najbaraj terenoj.

Ni pensas unuavice pri AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj de Sammarino), kiu aplikas la Internacian Lingvon por aranĝi seminariojn, kursojn, ekzamenojn, tiel liverante internaciajn diplomojn kaj sciencajn agnoskojn. AIS ne precipe okupiĝas *pri* la instruado de Esperanto, sed uzas tiun lingvon por ĉiutema instruado je universitata nivelo. Krome ĝi kunligas per dokumentaro kaj informiloj centojn da scienculoj en ĉiuj mondopartoj, kiuj en iuj landoj organiziĝas en lokaj filioj. Speciale interesa por ni instruistoj povas esti la sektoro de AIS, kiu studas la klerigsciencojn kun aparta atento al la Kibernetika Pedagogio.

Duavice ni celas universitatojn, kie okazas ne nur enkondukaj elementaj kursoj pri la Internacia Lingvo, sed kie oni povas enprondigi kaj perfektigi en la esperantologiaj kaj interlingvikaj studoj. Ekzistas pluraj katedroj pri Esperantologio en la mondo, kelkaj apenaŭ konataj ekstere, sed tiu kiu nuntempe ofertas la plej ampleksan perfektigan kursaron estas la *Universitato de Poznan* en Polujo, kie oni povas partopreni sen daŭra fizika ĉeestado, loĝante en siaj propraj landoj.

Triavice konsiderindas la interlingvika kaj lingvopolitika esplorado, kiu iomete okazas – ie kaj tie – en diversspecaj esplorinstitutoj, kaj pri kies kunordigo okupiĝas UEA per sia aparta organizo *CED* (Centro de Esploro kaj Dokumentado), kiu kompilas utilajn bibliografiojn, informilojn, kaj TTT-paĝarojn.

Do la ideo, kiun ni volas realigi – interkonsente ankaŭ kun UEA – estas, ke ILEI pli sisteme kaj komplete okupiĝu pri *ĉiunivela* instruado de Esperanto, dum institucioj kiaj AIS uzas Esperanton (krom aliaj lingvoj) en universitata instruado, kaj CED kunordigas la sciencan esploron pri la *Esperanta fenomeno*. Tiel niaj respektivaj iniciatoj sur tiuj diversaj ebloj povas komplemente kunefiki.

3. Instruista trejnado

Granda parto de la instruado de Esperanto – ni konfesu al ni mem – okazas ankoraŭ spontane kaj improvizate. Tio estas historie tute komprenebla: ni estas en tia stadio de nia kleriga sistemo, kiel tiuj evolulandoj, kie pro manko da profesiaj instruistoj, la junuloj kiuj sukcesas fini la mezlernejajn studojn, ekinstruas en la elementaj lernejoj, sen specife profesia trejnado. En niaj klubaj kursoj ofte instruas homoj kiuj iom kaj iel konas la lingvon, sendepende de siaj instrukapabloj. Fakte la profesieco de niaj lingvaj instruantoj estas tre varia laŭ landoj kaj eĉ ene de la unuopaj landoj.

Tamen rimarkindas ke en pluraj landoj – mi pensas ekzemple pri Hungarujo, Finnlando kaj, se mi bone memoras, Kubo – ekzistas landaj sekcioj,

kiuj sisteme aranĝas *pedagogiajn seminariojn*, kie oni aŭskultas instrufakajn prelegojn, prezentas instrumaterialojn kaj modellecionojn, diskutas pri instru-teknologioj, planas kursojn kaj ekzamenojn. En aliaj lokoj okazas periodaj kunvenoj de Esperanto-instruuloj (kiel en la internacia ILEI-konferenco, kie ofte prezentigas bonkvalitaj prelegoj) kaj cirkulas regione interesaj fakaj bultenoj (kiel, ekzemple, la germana, kiun mi vidis antaŭ kelkaj tagoj, aŭ la pli konata nordamerika).

En tiom bunta situacio, kie pro konataj kaŭzoj miksiĝas profesiaj proponoj kun improvizecaj iniciatoj, endas ekpensi pri pli sistemeca kaj ĝenerala *trejna organizo*, kiu komencu sian agadon, kunordigante la nunajn lokajn trejnajn aranĝojn, metante al si la meztempan celon diskonigi kaj disvastigi la plej bonajn modelojn de trejnaj seminarioj kaj materialoj. En tia klopodado konstrui iom post iom ĝeneralan instru-trejnajn sistemon, eblas ankaŭ konsideri, ĉu malĉeestaj instru-teknologioj povas – eĉ se nur helpe – kontribui al nia situacio, kie grandas la problemoj kaj malabundas la rimedaroj.

4. Kunlaborado kun UEA kaj TEJO

Dum la lastaj monatoj en UEA-medioj, eĉ se ne formale, oni ekdiskutas pri la efektivigo de la antikva revo, en kiu UEA estas granda kaj forta korpo (aŭ arbo), kies juna branĉo estas TEJO kaj kies instrua brako estas ILEI. Temus ne nur pri retorikaj analogiaj figuroj (arbo/branĉo, korpo/brako), sed pri la volo kongruigi la respektivajn planojn kaj agojn, ne nur internacive sed ankaŭ landskale.

Enlanda kunlaborado inter la Landa Asocio (LA) de UEA kaj la tieaj Landaj Sekcioj (LS) de TEJO kaj de ILEI povus aspekti kiel nura bagatela mem-evidentajo, dum ankoraŭ ie tio estas solvenda (aŭ eĉ ne konsciata) problemoj. Sed pri kio konkrete ni kunlaboru? La kunlaborebloj de ILEI/UEA kaj TEJO/UEA estas pli facile imageblaj. Tial mi volas laŭte cerbumi ĉefe pri la rilato inter ILEI kaj TEJO.

Evidente la “esperantista junularo” povas esti koncernata de lernaj kaj instruaj aferoj ĝuste el tiuj du flankoj:

A) la gejunuloj kiel Esperanto-lernantoj;

B) la gejunuloj kiel Esperanto-instruantoj.

En ĉiaj situacioj, kie oni aranĝas instruadon specife al junaj aĝo-zonoj, troviĝas naturaj grundoj, kie TEJO helpu al ILEI, por pli celkonscie kaj efike fari tion. Ni pensu ekzemple pri la jenaj tri junularaj tavoloj: la universitata, la mezlerneja, la “infana”.

A1) Supre (par. 2) ni menciis la planatan engaĝon de ILEI je universitata nivelo. Ĉu ni kune kun TEJO ne povas kontakti la Esperanto-studentojn, registri la universitatajn E-klubojn, kolekti informojn pri Esperanto-koncernaj, sciencaj

esploroj, magistrigaj kaj doktorigaj disertajoj, studentaj konkursoj kaj inter-universitataj interŝanĝoj?

A2) Plurfoje dum la pasinteco ILEI aranĝis apud la internaciaj konferencoj la tiel nomatajn “gimnaziojn”, kie mezlernejanaj unusemajne lernis pri iuj temoj en alloga plurkultura etoso, kaj kie instruistoj ĝuis instruadon al plurnacia klaso kaj povis eĉ metode eksperimenti. Estonte ni volus novigi tiun iniciaton, igante ĝin ambaŭflanke pli alloga (bedaŭrinde tio ne okazos en Kroatoj pro la ĵusa forpaso de la grandmerita iniciatintino Zsuzsa Barsay). Ĉu el TEJO ne povas veni kompetentaj sugestoj por la enhavoj, la manieroj kaj la varbvojoj de tiaj mezlernejanaj staĝoj? Simile ni povas pensi pri la porjunulaj programoj dum la Universalaj Kongresoj.

A3) Almenaŭ ekde la pasinta jaro en Israelo ni – pere de nia senlaca vicprezidanto Stefan MacGill – kunlaboras kun UEA en la pretigo kaj okazigo de la famaj Internaciaj Infanaj Kongresetoj (IIK). Kiel la plej longvidaj TEJO-estroj jam bone konscias, la IIK-oj estas ne nur bela libertempo por la “infanoj” kaj “liberigo” por la koncernaj gepatroj, sed ili finfine estas ankaŭ “bredejoj” de ontaj TEJO-anoj. La infanoj, kiuj eklernis la lingvon hejme, en la kongreseta medio malkovras la guston apliki ĝin kun alikulturaj samaĝuloj. Ofte tie ili ekspertas ke tiu lingvo ne estas nur komplezo al la plenkreskuloj sed plaĉa utilaĵo por si mem.

B1) Se estas relative spontane pensi pri la gejunuloj, kiel *lernuloj*, malpli aŭtomate ni vidas ilin kiel eblaj *instruuloj*! (Kompreneble memorindas de TEJO-anoj plejparte ne estas infanoj, sed gejunuloj inter 20jara kaj 30jara aĝo.) Lastatempe TEJO tre interesiĝas pri aranĝoj lingvo-diskonigaj kaj lingvo-lernigaj, kiel ekzemple la Lingvaj Festivaloj, kiuj, komencitaj antaŭ kelkaj jaroj en okcidentaj landoj, nun entuziasme okazadas ankaŭ oriente. Kiel sciante, *Lingvaj Festivaloj* estas kelktagaj renkontiĝoj, kie oni sinteze kaj specimene prezentas multajn lingvojn - grandajn kaj malgrandajn - al ĝenerala (precipe studenta) publiko. Esperanto tie rolas kiel subkomprenata pontolingvo, kaj tiel ĝi kreskigas sian prestiĝon. La Lingvaj Festivaloj evidente estas interkulturaj aranĝoj, kies celoj kaj rezultoj iel parenas (eksterlerneje) nian Interkulturan projekton (par. 1). Kial ne plani ian spert-interŝanĝon kaj sinergion inter la du sistemoj? Pri tio gejunuloj (kaj ne-) ekdiskutos fine de marto en Budapeŝto, dum la seminario *Lingva Ĉielarko*, aŭspicie de la Eŭropa Konsilantaro.

B2) Krome en studentaj rondoj, kie oni lernas la Internacian Lingvon inter aliaj fremdaj lingvoj, cele al klerigo de lingvo-instruistoj, oni prave ekinteresiĝas ne nur pri la lingvoj mem, sed pri ties instrumanieroj kaj instruiloj. Tiukadre ankaŭ

en TEJO naskiĝas atento al la problemoj de instruula trejnado (v. supre paragrafon 3).

Ĉu kombineblas la sendube pli profunda sperto de “maljunaj” Esperanto-instruantoj/intoj kun la imagebla entuziasma vigleco kaj novigemo de Esperanto-studentoj? Jes, kondiĉe ke oni plane organizu tion. Unuflanke oni povas aranĝi Esperanto-kursojn por studentoj, kie samtempe kun la lingva ekzercado, oni ekprovu la guston de lernigado kaj instruplanado. Aliflanke ILEI kaj TEJO povas konstrui internaciajn situaciojn (ekzemple dum aŭ apud kongresoj kaj seminarioj kiel la *Lingva Ĉielarko*), kie oni pridiskutu kaj elprovu diversajn instrumodelojn, celante la heredigon de la malpli junaj spertoj kaj la elformadon de multaj bezonataj junaj instruantoj.

B3) Tiu ideo kunligiĝas ankaŭ kun alia ekdiskutita plej pinte de UEA/ TEJO/ ILEI, ke ni respondu al la malsato de Esperanto-instruantoj en novaj landoj (ekzemple afrikaj), per zorga profesia trejnado de novaj junaj (vojaĝemaj) instruuloj, kiuj per financa helpo de UEA vojaĝu al tiuj movade malfortaj landoj kaj restadu tie dum iuj periodoj kiel *gast-instruantoj*.

5. Konklude

Nuntempe UEA klopodas reorganizi la kontinentajn aŭ landarajn komisionojn (Afrika, Azia, Amerika, Balkana, Mezeŭropa, Eŭropunia, ...) tiel ke ili efike funkcii kiel renkontejoj de la landaj movadoj (pli aŭ malpli organizitaj) kun komunaj aŭ parte similaj problemoj kaj rimedoj. Ĉu ni kaptu ĉi tiun okazon por regione ekrealigi kaj elprovi la supre menciitajn rilatadojn kaj kunagadojn inter la *instruula brako* (ILEI), la *junulara branĉo* (TEJO) kaj *forta trunko* (UEA)?

Ĉu ni diskutigu la diritajn temojn ankaŭ en la landaraj renkontiĝoj, kiel la venontjuna Danuba Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo (DESKF), kie niaj hipotezoj povas esti kontrolataj kaj priplanataj?²

Memkompreneble la juli-aŭgusta internacia konferenco de ILEI en Lovran (Istrio) nepre donos konvenan spacon al tia laborplanado, kaj simile – ni esperas – la medioj kie oni jam nun prilaboras la novan trijaran laborplanon de UEA.

Konklude mi volas deziri por la nun komencata jardeko (la “dumilaj” jaroj 2001-2010) ke ni, proponantoj de *nova lingva ordo* kapablu rigardi – preter niaj etaj demandoj pri supersignoj, novaj vortoj, kaj statutoj – al la manieroj kiel pli firme aranĝi nian ekziston kaj videblon en la familioj, en la bazaj kaj mezaj lernejoj, en la universitatoj, klerigejoj kaj esplor-institutoj.

Sukceson en la nova jaro!

² Pri DESKF/5 vidu apartan artikolon en la nuna numero.

Dr. Katalin Smidéliusz

Raporto pri la lastaj atingajoj de la ID-projekto

Post nia lasta IPR-raporto (99/4) pri la stato de la projekto okazis multaj gravaj aferoj pri kiuj ni nun mallonge raportu al la legantoj de IPR, menciante ke ĉiu ero meritis plurpaĝan raporton, analizon (kiuj fakte estas farataj en nia dokumentaro).

Post la unuaj du mondskalaj kursoj, kiuj okazis en Nederlando kaj dum kiuj trejniĝis 33 reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, konstruiĝis reto inter ili, pli ol duono de ili havas daŭran kontakton kun la teamo kaj inter si per la reto kaj aliaj komunikiloj, kaj uzas Esperanton kiel komunan lingvon.

La projektorganiza teamo daŭre laboras, konstantaj celoj estas teni la komunikadon viva, serĉi sponsorojn, informi pri la projekto, malkovri novajn terenojn, konstrui nian ttt-ejon, plibonigi la kursmaterialojn, distanc-instrui E-on. Ne pasas tago sen kontaktiĝo inter unuj kaj aliaj, do la projekto fariĝis nia ĉiutaga vivo.

Teama kunsido:

Por havi superrigardon kaj harmoniigi la kunlaboron la teamo havis sukcesplenan labor-semajnon en aprilo 2000 en Nederlando. Ni interŝanĝis ideojn kaj spertojn kaj pripensadis diversajn aspektojn de la projekto kaj ties perspektivoj. Ni dediĉis grandan atenton al transkultura komunikado, kiel plenskala tria instrumento de la ID-ambasadoro krom Esperanto kaj la modernaj komunikiloj.

Regionaj kursoj:

La teamo plue kontaktiĝis kun indiĝenaj organizaĵoj, trovis pliajn kandidatojn por la sekvaj mondskalaj kursoj, sed aperis bezono okazigi ankaŭ regionajn kursojn, renkontiĝojn kaj trejnadajn. Kadre de tiu koncepto Atilio Orellana Rojas gvidis kurson en Barato (raporton pri tio vi trovas en IPR 99/4) kaj okazis simila regiona kurso ankaŭ en Kostariko en la printempo 2000, sub la gvidado de Atilio kaj Antonio Leoni de Leon.



La unua afrika ID-regiona kurso okazis en Burkina Faso, inter la 20-a kaj la 30-a de junio. Sylvain Lelarge kaj Katalin Smidéliusz gvidis ID-kurson por dek kvin reprezentantoj de dek organizadoj, plejparte tuareg-aj, sed ankaŭ peŭl-aj kaj be-aj. TIN HINAN, organizado por la disvolvigado de nomadaj virinoj, gastigis la kurson. La kurs-gvidantojn helpis Jean Codjo, esperantisto el Benino. Krom la Esperanto-kurso, pri kiu respondecis Katalin, estis detala prezentado de la projekto kaj viglaj diskutoj pri: *kiu estas la rolo de ID-ambasadoro; kiel plej bone enkonduki la projekton al kolegoj; kiel pensi kaj komuniki transkulture.*

Ankaŭ en Komilando (Rusio) stariĝis nova generacio! - Inter la 25-a de junio kaj la 8-a de julio 2000, okazis en Syktyvkar grava regiona ID-kurso, en la Komia Respubliko (nordo de Rusio). La kurso estis plejparte organizata de Vasilij Kiselev (ID1 - Komia popolo). La kursejo estis la Finn-Ugra kultura centro. Amikiĝis ok partoprenantoj el kvar popoloj: la komia, la vepsa, la maria kaj la karela. Aleksandro Melnikov gvidis la Esperanto-kurson kaj Sylvain Lelarge prezentis detale la projekton kaj ties novajn perspektivojn, kaj faris intervjuojn de ĉiu partoprenanto.

Pluaj planoj por disvolvi regionajn kursojn estas jam faritaj, Ruben Ortiz (Gvatemalo), Vasili Kiselev (Komio en Ruslando) kaj Jebra Muchahary kaj Maria Mangte (Barato) kunlaboras kun la ID-teamo por doni formon al la tri venontaj regionaj kursoj. Estas por la sekvaj jaroj bonaj kontaktoj en Vietnamo, Ruando, Peruo, kaj Oceanio. Sed unue la unuaj!

ID en Ĝenevo

Inter la 22-a kaj la 30-a de julio okazis la semajno de la UN-Laborgrupo por la Indiĝenaj Popoloj en Ĝenevo. Tiu Laborgrupo estas la plej malalta kaj malgranda UN-subsekcio, sed ĝia ĉiujara laborsemajno estas la (laŭnombre) plej granda evento en la UN-sidejo. La ĉi-jara semajno estis speciale grava por du kialoj:

Okazis ĉiutage diskutoj en Esperanto inter la ID-delegatoj, kaj ili povos rekte raporti al la aliaj ID-anoj kaj pontlingve respondi iliajn demandojn, plenumi petojn tra la reto (estis instalita ID-oficejo kun unu komputilo en ĉiu pont-lingvo). Partopreni tiun semajnon povis entute 11 ID-anoj, kaj povis interkonatiĝi eĉ tiuj, kiuj trejniĝis en diversaj sesioj. La ID-okazintaĵojn gvidis Sylvain Lelarge, Antonio Leoni de Leon kaj Katalin Smidéliusz, vizitis nin kaj kunlaboris ankaŭ Mark Fettes flanke de ESF (*Esperantic Studies Foundation*), ja la fondaĵo planis subvencii la projekton.

Antaŭ kelkaj semajnoj venis la bona novaĵo: 'Daŭra Forumo' de indiĝenaj popoloj ĉe UN estas adoptita, kio signifas agnoskon kaj pli da ebloj por la indiĝenoj en la estonteco.

La sekva mondskala kurso

Pro la fakto ke Narwal (nia ĝisnuna gastiganto) nun estas tro multekosta por nia pagpovo, ni devis trovi alian bazon por la sekvaj kursoj, sekve de tio ID3 ni planas organizi en Hungario, en la hejmregiono de Katalin. En "*Velem*" (nomo de la vilaĝo) la mondskalaj kursoj de ID povus okazi en aparta domo kun parko, meze de natura regiono. La elekton de la loko multe influis ne nur financaj konsideroj sed ankaŭ la fakto ke la universitata lingvistika fakto de Katalin pretas subteni la projekton kaj oficiale inviti la partoprenantojn. Sur la kandidatlisto reprezentigas la sekvaj popoloj: tuaregoj el Burkino, Maŭritanio kaj Niĝerlando, be el Togolando, batvao el Ruando, majaoj el Meksikio kaj Gvatemalo, adivazoj el Barato, ŝoŝono kaj Tlingito el Usono, maorio el Nov-Zelando, janeŝa el Peruo, mapuĉo el Ĉilio, miskito el Nikaraguo, karelio, komio, vepso, mario el Rusio.

La ID3 kurso en multaj aspektoj malsimilas de la antaŭaj:

- ni donos pli da prioritatoj al la pritraktado de interkulturaj problemoj
- dediĉos pli da tempo por la lernado kaj aplikado de elektronikaj rimedoj kaj al la hejmpaĝo
- la kurso havos fiksan temon: edukado, kiun ni pritraktos plurnivele teorie kaj spertos praktike
- ni dediĉos pli da tempo por la ekkono de la medio kaj problemoj de la reprezentataj popoloj, kaj iom malfermiĝas al la loka medio, ekhavas kontaktojn kun kelkaj el la hungariaj minoritatoj kaj planas komunajn programojn kun la loka studentaro
- krom la kutima lingvokurso okazos paralela trejnado de la regionaj ttt-ejestroj

La kurso ID3 unue estis planita por januaro 2001, sed devis prokrastiĝi, parte pro manko de sufiĉe da mono, parte pro la instato de Bessie Schadee, direktorino de la projekto. Laŭplane la kurso okazos en aŭgusto 2001 en la antaŭe planita loko.

Kernotagoj en januaro

Post la decido prokrasti ID3 ĝisomere ni decidis pripensi la situacion de ID, tiri la konkludojn kaj klare elabori la pluan strategion, kies kerno devus esti involvi la indiĝenajn ambasadorojn en la fluo de komunikado inter si. Do la teamo kune kun la plej aktivaj ID-anoj decidis organizi gravajn *'kernotagojn'* en Nederlando inter la 12-a kaj la 27-a de januaro 2001. Mem la kunvenoj okazos en IEI, instituto kiun gvidas Atilio. Dum tiuj tagoj 10 aktivaj ID-anoj (Barato, Afriko, Rusio, Kostariko) donos pliajn formon al ID kaj montros ke ĝi vere funkcias, valoras, kaj vivpovas. Tiuj tagoj estos momentoj de vero. Ni kontaktos laŭeble dume ĉiujn ID-anojn kaj ID-subtenantojn por inkludi ilin en la pensprocezon. Okazos daŭraj komputilaj lecionoj kaj ankaŭ Esperanto parolekzercoj.

Serĉado de sponsoroj, apogantoj

La funkciigo de la projekto bezonas multe da mono, kaj ties trovado estas la plej malfacila tasko por la teamo. Daŭre ĉasi subvenciojn, organizi informvesperojn kun prezentoj kaj monkollektado, kontakti grandajn firmaojn, monhavajn individuojn kaj potencajn organizojn prenas multe da tempo kaj energio. Ni daŭre informas niajn subtenantojn per elektronikaj cirkulleteroj. (Se ankaŭ vi interesigas pri tio, bv. turni vin al sylvain.lelarge@usa.net).


ID estis premiita dum la Universala Kongreso de Esperanto, kaj apogata de scienca fondajo. ESF: la Esperanta mondreto agnoskas ID kiel tre valoran projekton kaj – kvankam la financoj de Esperantistoj ne estas grandaj – regule mone apogas nian projekton. Krom la 'Cigno Premio' kiun japana entreprenisto laŭ la konsilo de UEA donacis al ID ankaŭ la scienca Fondajo ESF (Esperantic Studies Foundation) decidis subteni la dokumentadon, la TTTejon, kaj la pedagogian aspekton de ID. Ni dankemas!

Ni atendas respondon al nia subvencipeto sendita al la FAME-fondajo, kaj kompreneble ĝojas pro la individuaj monhelpoj kaj laborhelpoj de unuopaj esperantistoj, plejparte instruistaj kolegoj, membroj de ILEI, kiuj per tradukoj, korespondado, konsiloj, serĉado de pliaj sponsoroj, aŭ komputiloj multe kontribuas al la projekta laboro.

Estis tre bonaj formoj de apogo, kiam niaj ID-anoj povis kaj povos partopreni lingvokursojn, okazintajn en ilia (relativa) proksimo. Tiel estis invitita majaa junulino al la somera kursaro en San Francisko, kaj en januaro 2001 partoprenos aŭstralian kursaron du ID-anoj el Papuo. Alia ekzemplo: novzelandaj kolegininoj pretis doni enkondukajn lecionojn pri Esperanto por iu el niaj estontaj kandidatoj. Dankon por tiutipa subteno.

Diversaj tre seriozaj **ne-esperantistaj partneroj** – kaj dekoj da individuoj – multmaniere subtenas la projekton kaj kuncerbumas. Inter pluraj aliaj, estas nomindaj:

- ◆ **Nederlanda Centro por Indiĝenaj Popoloj NCIV** (www.nciv.net): helpas precipe por selekti la kandidatojn kaj havas nun du gravajn projektojn kune kun ID
- ◆ **Internacia Instituto por Komunikado kaj Evoluo IICD** (www.iicd.org) subtenas la disvolviĝon de la teknika flanko de ID kaj trovas novajn partnerojn tiukampe
- ◆ **ITU** (*International Telecommunication Union* = Internacia Telekomunika Unio) (www.itu.int) ebligas kunlaboron, trejnadon de teamanoj pri distanca instruado kaj trejnadon de kelkaj indiĝenaj ambasadoroj.
- ◆ **EECALL** (*Eastern European Computer Assisted Language Learning Center* = Orient-Eŭropa Kompute Helpata Lingvolernado) (HU), funkcia en la katedro pri aplikata lingvistiko en Hungario, Szombathely, ebligas sian komputilejon dum la hungariaj kursoj
- ◆ Sekretario de **HCHR** (*High Commisariat for the Human Rights*) en Ĝenevo: organizas la semajnon de la Laborgrupo por la Indiĝenaj Popoloj, kaj ebligas al ni prezenti la programon tie.



La sponsoroj (inter aliaj du bankoj: ASN kaj Triodos kaj la Nederlanda Ministerio de Eksterlandaj Aferoj) donacis aŭ pruntedonis grandegan sumon por la unua periodo. Aliaj sponsoroj verŝajne pretas subteni la sekvajn paŝojn.

Eble indus ĉi tie raporti pri kurioza postsekvo de iu sponsorserĉado. Post la prezentado de la ID-projekto dum kunveno de nederlanda Rotary-klubo venis intereso ne nur pri la situacio de indiĝenoj, sed ankaŭ pri Esperanto. Entuziasma grupo de la membroj decidis provi lerni la lingvon kaj ankaŭ mem sperti ties facilecon, komunik-rimedojn kaj pere de tiu lingvo ekkontakti la ID-anojn kaj la mondon de esperantistoj. Sylvain kaj Katalin okazigis al tiuj 9 personoj unusemajnan intensan E-kurson, kies rezultoj estas tre kuraĝigaj. Ni sendube allogis novajn, tre entuziasmajn esperantistojn kiujn ni daŭre instruos rete. Kelkaj el ili jam en Zagrebo volas sperti la uzon de E-o. Kaj ni eĉ ne parolu pri la financa helpo per kiu ili kontribuis al la ID-budĝeto!

Agado de ID-anoj

Kelkaj el niaj ambasadoroj multe aktivas en siaj terenoj, Rusio-Komikongreso: modelo por politika agado (de Vasili Kiselev – ID1); lukto kontraŭ la Boruca barajo en Kostariko (Gilbert Gonzales Maroto – ID1) pri kies rezultoj vi povas havi pli da informoj sur nia ttt-ejo (www.idnetwork.nl).

La Sebalinda-projekto

Ni menciuj ĉi tie nur unu el inter la subprojektoj de ID, kiu ekis unue por subteni la gefilojn de nia forpasinta amiko Gaspar Sebalinda, kiu kun la edzino Clotilde partoprenis la unuan ID kurson. Poste la afero pli vastiĝis kaj ni celas krei lernejon por la Twa-(batvaj)-infanoj en Ruando, kies organizadon transprenis Clotilde. Nun kreiĝas kompleta ag-plano, mi citu nur la ĉefajn celojn de la projekto:

CELOJ DE LA PROJEKTO

1. *eduki junajn batvajjn profesiulojn, kiuj kapablas unuflanke perlabori la propran vivon, kaj aliflanke kontribui je la kresko, disvolviĝo, kaj je la harmonia integriĝo de la batvaĵoj en la ruanda socio*
2. *ebligi al la batvaj junuloj koni sian propran kulturon kaj fieriĝi pri ĝi, kaj doni al ili la rimedojn por sukcese alfronti la faktan diskriminadon, tiel ke ili povu iĝi plenvaloraj civitanoj*
3. *doni novan ŝancon al tiuj batvaj infanoj kiuj estis ekskluditaj el la publika edukistemo*
4. *inicii pliboniĝon de la vivkondiĉoj (ekonomiaj kaj kulturaj) de la tuta batwa komunumo*

5. *helpi konservi, protekti kaj evoluigi la batvan kulturon cele kontribui al la nacia kaj internacia kultura riĉeco*
6. *valorigi kaj disvolviĝi la diversajn batvajjn metiojn tiel ke ili plidaŭrigu kaj ke la metiistoj ekhavu stabilan ekonomian bazon*

Konkludo:

Ĉiujn aspektojn de la projekto estus malfacile priskribi. Kiel en granda familio ankaŭ ĉe ni ĉiutage okazas kaj farendas io grava.

Se ankaŭ vi volas helpi nin, partopreni en tiu mirinda laboro, bv. kontakti nin.


La ID-teamo (Bessie Schadee, Sylvain Lelarge, Atilio O. Rojas, Antonio Leoni de Leon, Ana Montesinos, Aleksandro Melnikov, Katalin Smidéliusz kaj Snjejana Cimic) estas kontakteblaj laŭ la narwal@usa.net -fakso + 31 70 51 77 682 – telefono+ 31 70 51 77 523 - adreso: Oud Clingendaal 7, NL 2245 CH Wassenaar, Nederlando, ĉe la officeja adreso de la projekto kaj volonte respondos al viaj demandoj.

Nia kontonumero ĉe UEA: idid-r.

ILEI ĉe UNESKO

La 24-an kaj 25-an de novembro 2000 okazis ĉe UNESKO kolokvo pri „KULTURO de PACO, IRANTA IDEO”. ILEI estis reprezentita de Renée Triolle el Francio [vidu la foton dekstre].

Krom la oficialaj plensesioj okazis „ateljeroj”. Mi partoprenis vendrede tiun pri „Plifortigo de kulturo de paco kaj neperforto en edukado” kaj sabate „Progresigi interkompreniĝon, toleremon kaj solidarecon”. En ambaŭ mi intervenis kaj miaj intervenoj estis klare cititaj en la pleno. Mi distribuis al la ĉeestantoj NROj la faldfoliojn pri „Interkulturo” kun resuma traduko en la franca kaj angla. Ĝenerale la homoj estis malfermaj al la lingvoproblemoj, ĉar ne en ĉiuj atelejeroj estis samtempa tradukado kaj uziĝis nur la angla kaj la franca: bona okazo elstarigi la





nedemokratiecon de la sistemo. ILEI aperis ankaŭ ĉe la ekspozicio de la NROj per granda afiŝo pri „Interkulturo” [vidu la foton].

Generala impresado estas, ke ni, E-instruistoj, faras ege pli ol la ceteraj por interkompreniĝo, toleremo, interkulturo ktp., sed por ni tio fariĝis banalajoj kaj ni ne plu atentis pri tio! Ni ne kapablas elstarigi buntajn ideojn (kiel ekz. tiu de tamburoj pri paco) kvankam ni laboras konstante laŭ tiuj gvidlinioj.

La „internaciaj” asocioj nomas sin tiaj, ĉar ili havas sekciojn

en pli ol unu lando, sed tute ne funkciigas agado(j)n inter nacioj.

Tre impresas en tiu medio ankaŭ belaj raportoj kun belaj titoloj. Do, instruistoj, bonvolu raporti regule pri tio, kion vi faras al ILEI; konsci, ke vi laboras konstante por kulturo de paco, ke via laboro estas ege valora. Kapablu fanfaroni laŭte pri via unika kaj elstara sperto pri vera interkultura internacieco!

Kulturi pacon per arto

Dum finiĝas la jaro pri „Kulturo de Paco”, komenciĝas dekjarlo pri la sama moto. Evidentiĝas, ke la diversaj formoj de arto (dancado, muziko, poezio k.s.) estas jam paŝoj al interkompreniĝo kaj interŝanĝo. Dum la kolokvo ĉe UNESKO estis akceptita, kvazaŭ ĝi estus mondska ideo, la iniciato de la asocio „Poezio-Infaneco”:

La 21-an de marto 2001 inter la 11.30 kaj la 12-a infanoj sub 13 jaroj tamburu ĉie en la mondo per iu ajn speco de tamburo (www.drumsforpeace.org).

Alvoko de la Nobelpremiitoj pri Paco pro la infanoj

Kunveninte la 10-an kaj 11-an de novembro 2000 en Romo la Nobel-premiitoj pri Paco atentigis pri tutmondiĝo, kiu unue konkretiĝas per ekonomia milito. Ili ankaŭ petis, ke ĉiam kaj ĉie la infanoj kaj la junuloj estu je la centro de la atento dum la jardeko pri paco. La infanoj plej suferas pro perforto kaj ili povas kun ni „lerni kiel praktiki aktive neperforton kaj krei novan kulturon: kulturon de neperforto kaj paco. Perforto ne funkcias.” (<http://www.nobelweb.org>)

Renée Triolle

Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, FR-13600 LA CIOTAT

El la landoj kaj sekcioj

Belgio

Korespondpeto

Mi serĉas intruist(in)on-esperantist(in)on en baza lernejo de ne-Eŭropa lando, kiu dezirus korespondigi (per iu ajn rimedo) siajn lernantojn kun lernantoj en Belga bazlerneja klaso. La lernantoj ne (devige) sciis Esperanton, sed Esperanto rolus kiel pontolingvo, pere de la instruistoj.

Phillipe Combet <Philippe.Combot@rug.ac.be>

Bulgario

Verdaj Steletoj vokas

Laŭtradicie en nia lernejo ekzistas vigla Esperanto-aktivado. La Rondo "Verdaj steletoj" nun unue planas renovigi la eldonon de la Internacia lernanta E-revuo, aperinta antaŭ jaroj. Due, omaĝe al la Internacia tago de la infanoj, ni organizos ekspozicion pere de materialoj ricevitaj el eksterlando. Se iu instruisto, lernanto, grupo k.a. deziras partopreni en la ĉi-supraj iniciatoj, bonvolu sendi, laŭ siaj eblecoj: leterojn, bildkartojn, ilustraĵojn, pentraĵojn, fotojn, bildkartojn ktp.

Adreso: S-ino Mariana Gencheva (Esperanto-rondo),

Gimnazio "C. Cerkovski", BG-5180 Polski Trambech, Bulgario

Ĉinio

Instrui en Ĉinio

Instituto pri Fremdaj Lingvoj de la Universitato de Shandong, Ĉinio serĉas franclingvan instruiston por instruado de la franca lingvo al ĉinaj studentoj dum unu aŭ du semestroj. Kapabla esperantisto havos la okazon instrui ankaŭ Esperanton.

Informoj ĉe: Liu Xiaojun, Universite de Shandong 27 hao str. Shan Da, CN-250100, Jinan Shandong R.P. de Ĉinio. Rete: l.x.s.@jn-public.sd.cninfo.net

Fonto: Eventoj N-ro 200

Hispanio

Fruktodona Seminario

Ĉi foje mi sentas la devon skribi kelkajn frazojn pri la seminario, kiun mi gvidis en Blanes, Hispanio. La „Oka Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo” okazis en Blanes (Girona) Katalunio de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro 2000. Mi gvidis kursojn por progresantoj kaj ankaŭ mallongan historian paroligan kurson. Sed ĉi-foje la organizantoj deziris okazigi elementajn ekzamenojn de ILEI/UEA. Ni, la instruisto Marti Guerrero i Cots kaj mi, laboris sufiĉe multe, sed 7 persersonoj hispanaj kaj francaj trapasis la ekzamenon! Ĉiuj el la preskaŭ cent partoprenantoj, inter kiuj multaj eksterlandanoj, estis tre

kontentaj. Mi devas varme gratuli la organizantojn, ĉar ili bone sukcesis kunligi lingvon, kulturon kaj turismon en laborema, simpatia, familia etoso!

Carla De Lorenzi

Jugoslavio

La 1-an de novembro 2000 komenciĝis nova E-kurso por Niŝaj gejunuloj. La kurson organizis Junulara Konsilio de Niŝ. La kursgvidantoj estas membroj de la urba E-societo: Momčilo Krstić, kun helpo de Mihailo Nešić kaj Valentina Djordjević. Dudeko da gejunuloj aliĝis al la kurso.

En Zaječar, loko je 70 km nordoriente de Niŝ, la E-societo okazigis A- kaj B-kursojn. Pro la aktiveco de la societo, pri kiu informadas ankaŭ la lokaj inform-medioj, intereso por lerni Esperanton daŭre ekzistas.

Informis: Zoran Ĉirić

Pollando

Jarkonferenco de la Pola Sekcio de ILEI

La sekva Esperantologia-Didaktika Jarkonferenco de la Pola Sekcio okazos inter la 28-29-a de aprilo 2001. Oni donos specialan atenton al diskutoj inter INTERKULTURO-instruistoj kaj metodika trejnado de kandidatoj por instui E-on kaj komencantaj E-instruistoj. Aliĝoj ĉe la sekcistrino, Maria Majerczak.

Pola ILEI-Sekcio

Esperanto en Eŭropaj Studoj

En Jagiellona Universitato, en Krakovo, Esperanto estas oficiale instruata en la Katedro de Prieŭropaj Studoj. La iniciatinto de tiu instruado, Maria Majerczak proponas al gestudentoj uzi la lingvon en internaciaj kontaktoj kaj partopreni internaciajn E-seminariojn, kursojn pri demokratio, homrajtoj, „eŭropaj aferoj”, sociaj temoj, aliaj kulturoj ktp. La kurso valoras kvar kreditpoentojn.

En ĉi tiu universitato E-o estas instruata de 1908 kun paŭzoj, kaj de pluraj jaroj seninterrompe, je du du-semestraj niveloj, kutime 3-4 horojn semajne al ĉiu grupo kaj ĉiam al deko da gejunuloj. Lastoktobre venis 36 novaj studentoj, seriozaj kaj tre atentaj je diversaj ecoj kaj valoroj de E-o. Ankaŭ la E-vivo de la Studenta Scienca E-Rondo estas riĉa. [...]

Al la kurso estas akceptataj ne nur studentoj de Prieŭropaj Studoj. La signifo de tiu instruado estas granda. Ekzemple, la 36 novaj gejunuloj studentaj en la Universitato 18 fakojn, devenantaj el 23 polaj urboj kaj vilaĝoj en diversaj partoj de la lando, provizos poste E-parolantojn al tiuj urboj/vilaĝoj kaj fakaj medioj.

Pola Sekcio de ILEI

Rumanio

E-instruado en du nord-orientaj vilaĝoj


En la lernojaro 2000/2001 komenciĝis fakultativa instruado de Esperanto en du lernejoj (po unu horo semajne):

- en la lernejo Slobozia oni instruas du klasojn (la okan kun 6, kaj la sepan kun 15 gelemantoj);
- en la lernejo Românești oni instruas E-on en la sepa klaso por 11 gelemantoj [vidu la foton].

Oni uzas la lernolibron de Mihai Trifoi aperintan en 1995 kaj la lernolibron de Ignat Florian Bociort, aperintan en 1990.

Kontaktoj kun aliaj E-klasoj kaj konsiloj de pli spertaj instruistoj bonvenas. Adreso: *Cursul de Esperanto, Școala generală Românești, RO-5866 com. Grănicești, jud. Suceava, Rumanio*

Informis: Ionel Oneț



Rusio

Nova ekspres-kurso en Kostroma

La 28-29-an de oktobro 2000 en Kostroma okazis nova ekspreskurso. Ĉi-foje ĝin gvidis E-instruistino el Moskvo Onjo Ĉernišova. Partoprenis ĝin ĉ. 20 personoj, el kiuj pli ol duono estis novuloj. Fine de la kurso okazis 'baptado de komencantaj esperantistoj' kaj festeneto okaze de la unujariĝo de la Kostroma E-teamo.

E-kursoj en Ivanovo

La 13-an de oktobro 2000 en la 21-a lernejo startis E-kurso de Andrej Obrezkov, al kiu amase venis interesiĝantoj, kiuj partoprenis la Ivanovan Lingvan Festivalon. Onidire, al la malfermo venis ĉ. 50 personoj. Poste ili estis disdividitaj je du laŭaĝaj grupoj - la infana kaj plenkreska.

La 1-an de novembro en Ivanova lernejo "Vunderkind" komenciĝis 5-taga rapidkurso, kiun partoprenis deko da lernantoj, 14-17-jaraĝaj.

La 27-an de novembro nova E-kurso komenciĝis en Ivanovo. Al ĝi aliĝis 10 knabinoj. Ĝin gvidas Nataŝa Grigorjevskaja.

Unuafoje dum jardekoj en Irkutsk startis E-kurso

Aktiva memlerninta esperantisto el Irkutsk Eŭgeno Delcov komencis fine de oktobro gvidi E-kursojn en Irkutsk ŝtata universitato. La universitato disponigis la ejon senpage. Bonvolu subteni la kuraĝulon per salutleteroj, konsiloj kaj ideoj! La reta adreso de Eŭgeno DELCOV estas <delcov@mail.ru>

Amasa instruado en Naberejniĝe Ĉelni

En la ekonomik-konstruista altlernejo de la urbo oni amase instruas Esperanton al la studentoj. La pli aĝaj studas ĝin devige (!) kaj la unuajaruloj rajtas propravole ekstudi en E-kursoj. En la altlernejo funkcias 30-persona E-klubo. Instruas du salajrataj instruistinoj, Nataŝa Anisimova kaj Nataŝa Nazariĉeva.

E-kurso en Nijnij Novgorod

„Etulino” el Nijnij Novgorod preparis novan E-kurson surbaze de unu el intensaj metodoj. La nunaj kursanoj en NN sukcese studas laŭ ĝi kaj baldaŭ ĝin ekuzos aliaj E-instruistoj de la urbo. Tio estas jam la kvara transdonebla E-instrumento en nia lando: post la ĉeboksara "Afrika metodo", moskva "Faru la rondon!" kaj ivanova "Ludmetodo". Fakte, eblas diri, ke en ĉiu aktiva E-centro oni nun uzas propran originalan instrumentodon.

Informis: Andrej Grigorjevskij <andreo@mailru.com>

Svislando

Informoj pri la Svisa ILEI-Sekcio

La sekcio konsistas el 15 membroj. Ĝi grupigas nur parton de la svisaj E-instruantoj. La sekcio en oktobro 2000 havis pertelefonan asembleon.

Mireille Grosjean, membro de la sekcio, en julio 2000 partoprenis en Parizo la asembleon de la „Association mondiale des éducateurs à la Paix”, en kiu ŝi reprezentis UEA-an kaj ŝi kunfondis svisan sekcion de tiu asocio. En Tel-Avivi ŝi akceptis troviĝi inter la tri ILEI-representantoj ĉe UNESCO en Paris.

La Konsilio de Eŭropo en Strasbourg proklamis la jaron 2001 „Eŭropa jaro de la lingvoj”. Okaze de tio Claude Gacond estas verkanta dosieron, kiun li havigos al porinstruistaj lernejoj kun propono dediĉi tagon al la ekzameno de la didaktika valoro de Esperanto. Li sendos tiun dosieron al la ILEI-kolegoj. Ĝi certe povos utili ankaŭ por aliaj kontaktoj kun pedagogiaj medioj.

laŭ „Svisa Esperanto-Societo informas” (2000, novembro/decembro)

Leterkesto

„Laŭ peto de Rob Moerbek, mi delonge voĉlegas por la blinduloj vian revuon. Farante tion mi spertas problemojn pri pluraj mallongigoj por mi nekompreneblaj. Multaj verkistoj de artikoloj opinias, ke mallongigoj de ili uzataj estas kompreneblaj por ĉiuj legantoj en la tuta mondo! Bedaŭrinde tio ne veras. Kaj se mi ne scias la signifon de mallongigoj, mi ne povas ekspliki ĝin al miaj blindaj aŭskultantoj, kaj tio ĝenas kaj min, kaj ilin! Do, ĉiu verkisto almenaŭ unu fojon ekspliku la signifon de la mallongigoj uzataj de li/ŝi. En la E-revuoj svarmas mallongigoj, kaj tio ne agrabligas la legadon.”

Hein Wernik, Prinsenaan 26, NL-6542 TB NIJMEGEN, Nederlando

Por via notlibro

DESKF: ĈIRKAŬDANUBA KUNLABORO

La kvina sesio de Danuba Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo (DESKF-5) okazos en Beograd, 2001/06/07-10, en organizo de Serbia E-Ligo kaj ĝia E-Instituto.

En sia unua sesio okazinta en Timiŝoara, 1997, laŭ iniciato de prof. d-ro Ignat Florian Bociort, DESKF difinis siajn ĝeneralajn agadkampoj: scienca, kultura, socia kaj turisma, kun la celoj, resume: progresigi egalrajtan kunlaboron kaj evoluigi interkonon en la koncernaj landoj ("donantaj akvon al Danubo"), establi daŭrajn interaktivajn kontaktojn, progresigi egalrajtan valorproduktan kunlaboron, progresigi la E-lingvajn instruadon, sciencon kaj kulturon, organizi

liberajn diskutojn pri aktualaj problemoj en diversaj kampoj (lingvaj plifaciligoj, ekologio, ekonomio, edukado, socirilatoj ktp.) kaj prezenti al decidofarantoj kaj al la plej larĝa publiko tiutemajn rekomendojn E-lingvaj kaj en etnaj lingvoj konsiderataj plene egalrajtaj.

La ĉeftemo de DESKF-5 estos: DANUBO – FAKTORO DE EKONOMIA KAJ KULTURA INTEGRIGO DE ĈIRKAŬDANUBAJ LANDOJ. En kvar sekcioj estos pritraktitaj diversaj aspektoj de integriĝoj en tiu multkultura kaj interkultura spaco. La sekcio pri "Esperanto kiel integriĝa faktoro en Danubio" turnos atenton al lernejoj, sciencaj, beletraj kaj ekonomiaj (esperantista entreprenismo) aplikoj de la Internacia Lingvo en la regiono. En apartaj programoj estos prezentitaj la movado de Lingvaj Festivaloj de TEJO kaj la projekto Interkulturo de ILEI kun la specifa subprojekto Proverbejo, kun precipa konsidero de ilia signifo por Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 en ĉirkaŭdanubaj landoj. La celo estas plu levi la prestiĝon de Esperanto, popularigi ĝin inter la gejunuloj kaj antaŭenigi ĝiajn instruadon kaj aplikadon.

Pliaj informoj riceveblaj de: Serbia Esperanto-Ligo (DESKF-5), Terazije 42, YU-Beograd, rete: Radojica Petroviĉ <radp@ptt.yu>.

RP

Infana kongreso jam altiris tridekon!

